第 8 期
2020-12

# 黄河 Flava Rivero

Duonjara Revuo



Letero de Zamenhof al Michaux
Ponto super Baro-rivero
Profesoro Lju
Peomoj en Prozo
Smeralda Lago

河南世界语者联盟
Henan-a Esperantista Grupo

# 目 录 Enhavo


| | | |
|---|---|---|
| **3** | Letero de Zamenhof al Michaux | Zamenhof |
| **8** | Ponto super Baro-rivero | Yin Jiaxin |
| **16** | Profesoro Lju | Wang Tianyi |
| **21** | Kion Diras la Serpent-kaptisto | trad. Pandiŝo |
| **23** | Poemoj en Prozo | trad. Zee |
| **25** | Kanto de Vento 风之歌 | 李传华 译 |
| **26** | Smeralda Lago 翡翠湖 | Harpina |
| **28** | Verŝajne 很可能 | 庄企雄 译 |
| **29** | Anekdotoj | P.Willliam |
| **31** | Karikaturo | anonimo |
| **32** | 世运短波 | 贾荣霞等 |


*La kovrilo: Mangya Smeralda Lago (foto de **Harpina**)*


## 鸣 谢

国际世界语协会副主席黄银宝先生向本刊捐赠 80 元，用以支持编辑部的工作，在此谨向他表示衷心感谢！

**本刊编辑部**



Flava Rivero
http://flavarivero.top
半年刊
2020 年第 2 期 总第 8 期

**主编：**张雪松
**编辑：**黄河编辑部
**出版：**世界语工作室
**邮箱：**redakcio@126.com
**网址：**http://www.esperanto.studio

# Letero de Zamenhof al Michaux[1]

### 21. feb. 1905

Kara sinjoro - Vi petas, ke mi donu al Vi detalojn pri mi kaj mia *vivo*. Tre volonte mi tion ĉi faros, *kiom mi povos*, sed bedaŭrinde mi povos fari ne tre multe. Jen estas la kaŭzoj: por la *estontaj* generacioj mia biografio eble estos ne seninteresa, ĉar efektive mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun prezentas unu konstantan kaj senintersompan serion da diversaj bataloj: a) *interne* en mi konstante bataladis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj, sed kiun reciproke interkonsentigi estis ofte treege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis b) *ekstere* mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenadis al la idealoj *en modo* kaj tial neniam mankis al mi mokantoj kaj atakantoj. Krom tio mi tre multe da jaroj havis grandajn kaj tre turmentajn klopodojn kun la akirado de mia pano kaj tiu ĉi batalado pri la pano tre venenis mian vivon. En la lastaj jaroj mi fine atingis tion, ke pano jam al mi ne mankas; sed ho ve, la longa batalado min tre lacigis, kaj nun, ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi jam sentas min kiel homo 60-jara.

Mi naskiĝis en Bialystok la 3/15[2]. de Decembro 1859. Mia patro (*marĝene*: kiu ankoraŭ vivas) kaj avo estis instruistoj de lingvo. La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t. e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (*marĝene*: en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion.). Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili

interesadis min ĉiam pli *teorie* ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere *parolis* nur en tri lingvo (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere, sed parolas ĝin *tre* malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.

En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur *senrajtan fremdulon* (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimas kaj premegas miajn fratojn; mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas. . . kaj mi multe suferis de tio ĉi, kaj mi komencis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plenrajte al *ĉiuj* siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkomprenos kaj ekamos unuj la aliajn.

En la jaro 1869 mi eniris en la Bialistokan realan gimnazion; sed post du monatoj mi devis eliri pro rava malsano (en mia infaneco mi tre ofte estadis malsana); en 1870 mi eniris denove kaj mi lernis kun grandaj sukcesoj (mi devas rimarki, ke en la tuta 9-jara daŭro de mia gimnazia lernado, kiel en Bialystok, kiel poste, en Varsovio, mi estis ĉiam la unua en mia klaso; la instruantoj rigardadis min kiel treege kapablan kaj miaj kolegoj profetadis (*marĝene*: sen ia envio, sed tre bondezire, ĉar neniam mi havis inter la kolegoj ian malamikon), ke mi havos en la vivo ĉiam la plej grandajn sukcesojn; tio ĉi tamen poste tute ne plenumiĝis kaj mi longe devis batali ĝis mi ellaboris al mia familio modestan panon). En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie mia patro ricevis la oficon de instruisto de germana lingvo en la reala gimnazio. Mi restis 5 monatojn dome por lerni la

lingvojn latinan kaj grekan, kaj poste mi eniris en la Varsovian 2-an filologian gimnazion, kiun mi finis en la jaro 1879. Tiam mi forveturis Moskvon kaj eniris tie en la medicinan fakultaton de la tiea universitato. Miaj Moskvaj kolegoj estis reprezentanto de tre multaj plej diversaj rasoj, kaj tio ĉi fortikigis en mi la celadon al unuigita homa familio. Baldaŭ la financa stato de miaj gepatroj fariĝis tre malbona, ili ne povis jam tenadi min en Moskvo, kaj tial en 1881 mi revenis Varsovion, eniris tie en la universitaton, kiun mi finis en la komenco de Januaro 1885. Mi forveturis tiam en la vilaĝon Vejseje, por komenci kuracistan praktikon. Praktikinte tie en la daŭro de 4 monatoj, mi konvinkiĝis, ke mi por la komuna medicina praktiko tute ne taŭgas, ĉar mi estas tro impresiĝema kaj la suferoj de la malsanuloj (precipe de la mortantoj) tro multe min turmentis. Tiam mi revenis Varsovion kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan, nome la malsanojn de *okuloj*. Mi laboris en la daŭro de 6 monatoj en la okulista apartaĵo de unu Varsovia malsanulejo, poste mi lernis kelkan tempon en la klinikoj de Vieno (Aŭstrujo) kaj en la fino de 1886 mi komencis okulistan praktikadon en Varsovio. Tiam mi konatiĝis kun mia nuna edzino, Klaro Zilbernik el Kovno (ŝi tiam gastis ĉe sia fratino, loĝanta en Varsovio). La 9-an de Aŭgusto 1887 mi edziĝis. Al mia fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne sole tute konsentis, sed ŝi donis al mia tuta dispono la sumon da mono, kiun ŝi posedis, kaj tio ĉi donis al mi la eblon, post longa vana serĉado de eldonanto, fine eldoni mem (*marĝene*: en julio 1887) miajn unuajn kvar broŝurojn (lernolibro de Esperanto en lingvoj rusa, pola, germana kaj franca). Baldaŭ poste mi eldonis la „Duan libron“, „Aldonon“, „Neĝan Blovadon“ kaj „Gefratojn“ (verkitaj de Grabowski), Tradukon de „Dua Libro“ kaj „Aldono“, Mezan Vortaron Germanan, plenan vortaron rusan, anglan kaj svedan lernolibron, Princinon Mary, Adresaron ktp., kaj mi ankaŭ donis la necesan monon por la eldono de

la verkoj de Einstein kaj H. Phillips. Mi ankaŭ donis multajn anoncojn en la gazetoj, dissendis grandan nombron da libroj ktp.

Esperanto baldaŭ forglutis la pli grandan parton de la mono de mia edzino; la tutan reston ni baldaŭ formanĝis, ĉar la enspezoj de mia kuracista praktiko estis terure malgrandaj. En la fino de 1889 mi restis sen kopeko!

Tre malĝoja estis tiam mia vivo. Mi devis forlasi Varsovion kaj serĉi mian panon en ia alia loko. Mia edzino devis forveturi kun mia infano al sia patro kaj mi veturis (en Novembro 1889) en la urbo Ĥerson (suda Rusujo), kie ne estis okulistoj (*marĝene*: tie estis nur unu okulistino), kaj kie mi tial esperis trovi panon por mia familio. Sed mia espero min terure trompis: miaj tieaj enspezoj ne sole ne donis al mi eblon nutri mian farnilion, sed eĉ por mi *mem* ili ne sufiĉis malgraŭ mia tre modesta kaj tre avara maniero de vivado! Mi simple kaj litere, ofte, ne havis eĉ kion manĝi: tre ofte mi restadis sen tagmanĝo! Nek mia edzino, nek miaj parencoj ion sciis pri tio ĉi, ĉar mian edzinon mi ne volis malĝojigi, kaj en miaj leteroj mi konstante konsolis ŝin, ke estas al mi tre bone, ke mi havas tre bonajn esperojn, ke mi baldaŭ venigos ŝin al mi ktp. Tamen fine mi ne povis jam pli elteni kaj mi devis konfesi al mia edzino la tutan mian staton. Mi estis tiam ankoraŭ tro fiera, por akcepti de iu monan helpon; tamen la malĝojego kaj la insistaj petoj de mia edzino devigis min akcepti monan subtenadon de mia bopatro (kiu tiam kaj ankaŭ poste neniam rifuzadis al mi sian helpon kaj elspezis por mi fre multe da mono) kaj mi revenis Varsovion, esperante, ke nun mia kuracista praktiko iros pli bone. En Majo 1890 mi revenis Varsovion.

Ankaŭ tiun ĉi fojon la espero min trompis. Miaj enspezoj tute ne pligrandiĝadis, miaj ŝuldoj kreskadis. Fine ne havante jam la eblon pli atendi, mi en Oktobro 1893 transloĝiĝis kun mia familio en la urbon Grodno. Tie miaj enspezoj estis pli grandaj ol en Varsovio kaj la vivo estis malpli kara. Kvankam ankaŭ en Grodno miaj enspezoj tute ne

kovradis miajn elspezojn kaj mi devis ĉiam ankoraŭ prenadi subtenon de mia bopatro, tamen mi pacience tenis min tie en la daŭro de 4 jaroj. Sed ĉar miaj infanoj pligrandiĝadis kaj postulis pli kostan edukadon kaj la urbo Grodno estas tiel malriĉa, ke okulisto neniam povos tie multe pligrandigi siajn enspezojn, tiel laŭ la insista deziro de mia bopatro mi en la fino de 1897 decidis denove reveni Varsovion kaj fari tie ĉi la lastan provon.

La stato de mia animo estis tiam terura. Mi sentis tre bone, ke tio ĉi estas mia *lasta* provo, kaj se ĝi ankaŭ *nun* ne sukcesos al mi, mi estas perdita. En la daŭro de la unua jaro mi preskaŭ freneziĝis de malespero. Sed fine, dank' al la lasta streĉo de mia energio, la sorto komencis esti por mi pli favora. Baldaŭ mia kuracista praktiko komencis pli kaj pli grandiĝadi kaj jam de la jaro 190l, ĝi estas tiel granda, ke miaj enspezoj tute kovras miajn elpezojn. Mi estas savita. Post multaj jaroj de granda suferado kaj batalado mi nun fine ricevis pli trankvilan vivon, kaj havas tute sufiĉan panon por mia familio (kvankam kompreneble mi devas vivi tre modeste kaj kalkuli ĉiun kopekon). Mi loĝas en unu el la plej malriĉaj stratoj de Varsovio, miaj pacientoj estas nomoj malriĉaj kaj pagas al mi tre malmulte; mi devas akceptadi 30-40 pacientojn ĉiutage, por havi de ili tiom, kiom aliaj kuracistoj havas de 5-10 pacientoj; tamen mi estas nun tre kontenta, ĉar mi havas mian panon kaj bezonas jam nenies helpon.

Mi havas nun 3 infanojn: unu filon kaj du filinojn.

Mi estas tre laca kaj lacigis ankaŭ Vin per mia longega letero. Adiaŭ!

Via **L. L. Zamenhof.**

——El ***Enciklopedio de Esperanto*（世界语百科全书）**

***Notoj:*** 1. **Michaux Alfred**, franca advokato, prez. de Bulonja Grupo, iniciatis kaj sukcesigis la unuan UK en Boulonge 1905.

2. **3/15** estas kalendara diferenco inter la rusa kaj Gregoria.

# Ponto super Baro-rivero

**▯ Yin Jiaxin**

**1**



Mia hejmo situas apud la nomata Datan urbeto inter montegoj. Sur deklivo sidas mia domo konstruita de la avo de mia avo. Ĉe la piedo de la deklivo fluas rivero nomata Baro. Mi ne scias, kial oni donis al ĝi tian nomon. Vere, ĝi ja devas nomiĝi Baro-rivero, ĉar ĝi baras al urbetanoj la vojon eliri eksteren. Por vendi legomojn en la urbo, oni devas veturi al Daye-subgubernio unue per boateto trans la rivero, kaj sekve per buso ĉirkaŭ tri horojn tra la montegoj. Mi morte malamas la riveron. Iutagon dum mia infaneco, la gepatroj vektportis batatojn por vendi en la urbo, kaj la prameto renversiĝis en la rivermezo. Ekde tiam mi kaj la pliaĝa frato fariĝis georfoj.

Niaj ĉiuj parencoj estas la familianoj de la pliaĝa onklo loĝantaj proksime. La onklo intencis kunvivigi nin kun sia familio, sed la onklino ne konsentis. Mi neniam plendas kontraŭ ŝi, ĉar ili, vivtenante du infanojn, ankaŭ vivas malfacile. La onklo por ni plugas kaj semas en la kampo, dum mi kaj la frato akvumas kaj sterkas. Per la rikolto, la vivgarantia mono de la registaro kaj vestoj donacitaj de bonkoruloj, mi kaj la frato povas nin mem vivteni. Danke al tio, ke oni parte reduktas kaj nuligas la kostojn, mi kaj la frato povas lernejon viziti.

Tamen, la frato lernas maldiligente. Ĉiufoje kiam mi riproĉas lin pro tio, li ĉiam diras, ke li ne ŝatas lerni nek volas lerni plu. Mi al li avertas, ke li neeble serĉos bonan laboron se li ne bone lernus. Li ĉiam al mi replikas, ke li nur bezonos okupiĝi pri kulturado aŭ alia fizika laboro en la estonteco .

Hejme mi mastrumas. Ĉiumonate mi faras striktan budĝeton kaj elspezas ŝpareme. Tion la frato neniam prizorgas. Li estas silentema. Precipe kiam li renkontas nekonaton, li kutime klinas la kapon. Li povas fari nenion alian ol laboron en la kampo. Mi okupiĝas pri lavado de vestoj , preparado de manĝaĵoj, sunumo de litkovriloj, bredado de kokoj, ordigo de la domo, kaj tiel plu, ke mi ŝajne estus la pliaĝa fratino.

Iun sabatan matenon venis al nia hejmo kvar oranĝflave vestitaj geonkloj, kiuj estis volontuloj de la Bajmaj Eduka Fondaĵo. De la ĉef-instruistino, mi jam informiĝis, ke la fondaĵo speciale helpas malriĉajn gelernantojn. La geonkloj postulis de la frato la loĝantaran registrolibron, dum mi verŝis por ili bolantan akvon. Bedaŭrinde, mi ne havis tefoliojn! Vizaĝe al nekonatoj, la frato restis silenta kiel muta koko, apogante sin kontraŭ la pordo. Ja estis mi, la plijuna kvazaŭ la pliaĝa, kiu respondis la pridemandojn de la geonkloj. Iu el ili, permesite de mi, tie kaj ĉi tie en la domo fotadis per la fotilo. Mi pensis, ke eble li estas mirigita de tia domo, kian li neniam vidis en la urbo. Depreninte la kovrilon de la kuirpoto, la onklino trovis la kaĉon el batatpecoj kaj maizpulvoro kun legomfolioj. Kortuŝite ŝi demandis al mi, ĉu tio ĉi ja estas manĝaĵo por ni. Jes, tion ĉi ni manĝas dum plejparta tempo ĉiujare, kial tio estas mirinda? Traserĉinte en la kuirejo ŝi eltrovis nenian manĝaĵon alian ol batatojn, maizpulvoron kaj brasikojn. Plue ŝi demandis, ĉu en la domo troviĝas rizo kaj tritika faruno. Tion ni ne povas senpripense aĉeti, nur escepte por festoj kaj la Novjaro.

La onklino ĉirkaŭprenis min per siaj brakoj kaj eklarmis, dirante: "Infanoj, tro mizere vi tiel vivas, ke mi kordoloron sentas!" Sed mi kaj

la fraton neniam sentas nin mizeraj. Mi ne volis plori. Sentante min komforta en la sino de la onklino kaj flarante ŝian aromon, mi do deziris, ke ŝi brakumu min pli longe.

Jam estis tagmeze, kiam la geonkloj ekforiris. Mi vere volis reteni ilin por tagmanĝo, sed la vortoj restis nur sur miaj lipoj, mi ne tion eldiris, konsiderinte, ke urbanoj kutimas manĝi rizaĵon kaj tritikan farunon, kiuj ne troviĝas en mia hejmo. Pardonu min, geonkloj! Vi alvenis de fora loko, kaj nun estis tempo por tagmanĝo, sed mi regalis vin per nenio. Ne riproĉu mian senĝentilecon, mi petas.

Rigardante la Bajmaj-geonklojn foriri al la pramejo, mi ekhavis deziron, ke la onklino povu min rebrakumi iutage.

En la urbeto troviĝas nur unu lernejo elementa. Ekde sia sepjara klaso, la frato devas loĝi kaj lerni en la mezlernejo trans la rivero. Mi permesas lin hejmenreveni nur unufoje po monato, ĉar la ir-kaj-revena prambiletoj valoras kvar jŭanojn; se li hejmenrevenus unufoje po semajno, sume dek ses juanoj elspeziĝus ĉiumonate. Kiel multe! Semajnofine en la mezlerneja kantino je malkara prezo aĉeteblaj estas manĝaĵoj: rizaĵo, mantooj el blanka tritika faruno, kaj ankaŭ pladoj kun viando. Kiel bone! Estas pli bone manĝi en la lernejo ol en la hejmo. Ĉiu-semajnofine, la malpuraj vestoj de la frato estas hejmenportataj de nia kuzino, la filino de la onklo, kaj ŝi sekve helpas transdoni la lavitajn de mi vestojn al la frato.

Efektive mi sentas timon, kiam mi sola restas hejme. Mi deziras, ke la frato revenu fari hejmtaskojn kaj ludi kune kun mi. Mi scias, ke la frato ankaŭ deziras min akompani. Tamen, ni ne kapablas pagi la prambiletojn. Ĉiu-vendrede post lecionoj, alkurinte al la rivero-rando, mi, starante sur la ŝtonego ĉe la pramejo, ĉirkaŭrigardas la transan pramejon, kie, laŭ antaŭdifino, la frato samtempe aperas, prenante siajn malpurajn vestojn kaj akompanante la kuzinon. Baro-rivero estas ne tre larĝa, mi kaj la frato povas klare vidi unu la alian. Ni reciproke mansvingas kaj faras gestojn, eĉ iom kriegas kun manplatoj volvitaj

ĉirkaŭ la buŝo kvazaŭ trumpeto. Mi apenaŭ povas klare aŭdi kion li krias, tamen, ne grava estas tio, kion li diras. Ja estas sufiĉe por mi nur aŭdi lian voĉon.

Po unu monato kaj duono, kun malgrandaj donacoj, la geonkloj kaj ankaŭ unu maljunulo de la Bajmaj Fondaĵo venas en la lernejon por doni lecionojn al ĉiuj klasoj. Kvankam mi ne denove renkontis la onklinon kiu min brakumis en mia hejmo, tamen ĉiufoje mi povas de Bajmaj-onklino ricevi intiman brakumon, kiu tre plaĉas al mi. Bonodoras ĉiu de la onklinoj. La aromo sentigas al mi feliĉon. La Bajmaj-volontuloj donas al ni diversajn lecionojn: muziko, danco, filozofiaj fabeloj, legado de klasikaĵoj, papertranĉado kaj tiel plu. Tio sentigas al mi, ke tre abunda kaj brila estas la ekstera mondo. Mi vere esperas, ke mi povos havi ŝancon travivi la eksteran mondon en la estonteco. Mi tre envias al urbaj gelernantoj, ke ili povas legi tiel multe da bonaj libroj kaj lerni tiel abunde.

La Bajmaj Eduka Fondaĵo iniciatis programon nomatan "Unu Libro por Unu Homo", kiu signifas, ke ĉiu lernanto senpage ricevos unu elektitan de si libron, kaj post la finlego interŝanĝos ĝin kun alia por legi pli multe. Prenante la libroliston, mi sentis min okulkonfuza. Kiaj multaj libroj! Kiel bone se mi povus ilin ĉiujn tralegi! Ekscinte tion, ĉirkaŭante unu onklon de la Bajmaj, mi kun dekkelkaj gelernantoj demandis: "Ĉu tiuj libroj vere senpage donaciĝos al ni?" Li respondis, ke la libroj estas kontribuitajn de bonkoruloj, kiuj esperas, ke ni povos serioze legadi bonajn librojn kiel eble plej multe. Sekve ni postulis la onklon paroli pri la Bajmaj Eduka Fondaĵo. Aŭdinte lian priparolon, mi kortuŝis ege. Neatendite, ekster la montegoj troviĝas multaj bonkoruloj, kiuj nin prizorgas sindoneme kaj senegoisme. Pri la maljunulo, kiu donas lecionon de papertranĉado, oni diris, ke li loĝas en la provinca ĉefurbo fore de pli ol kivincent kilometroj; ĉiufoje li elspezis multe da mono por al nia lernejo veturi unue per vagonaro kaj sekve per buso; per sia salajro li aĉetis la materialojn kaj ilojn por nia

papertranĉado kaj li mem faris belajn kajtojn egajn kaj etajn. Geonkloj kaj maljunulo de la Bajmaj, vi estas noblaj homoj. Mi volas fariĝi tia volontulino kia vi. Post plenkresko, mi nepre helpos aliajn kiel eble plej multe. De tiam mi ekkomprenis la signifon de "amo al ĉiuj" el la libro "Reguloj por Junaj Homoj", kiun la diketa onklo eksplikis. La onklo de Bajmaj demandis al ni, kio estas nia revo, mi diris, ke mi havas revon, ke en la estonteco mi povu konstruigi ponton super Baro-rivero por avantaĝigi la loĝantojn de la urbeto Datan. Levante sian dikfingron, la onklo al mi diris: "Eta knabino, tre bona estas via revo. Tio montras, ke vi havas bonan volon servi aliajn. Ĝi estas animo por publika bono. Mi devas laŭdegi vin, malgraŭ ĉu via revo realiĝos."

La Bajmaj Eduka Fondaĵo jam aprobis la monhelpan peton de gelernantoj el la lernejo. En la nomlisto de la peticio troviĝis mia nomo. La frato ankaŭ ricevis la helpmonon. Donante la helpmonon, mi informiĝis, ke mia monhelpanto estas onklino de Miaŭ-nacieco, kiu loĝas en gubernio de la okcidenta Hunan-provinco najbare al Guizhou-provinco. Kie estas Hunan? Kie estas Guizhou? Kaj kia estas la okcidenta Hunan? Ĝi certe estas tre malproksima, pli malproksima ol la ĉefurbo, kie la maljunulo loĝas, ĉu ne? Onklino de Miaŭo-nacieco? Ja estas unu onklino de Miaŭo-nacieco, kiu prizorgas min! Ŝi certe estas afabla. Ĉu ankaŭ eliĝas la animplaĉa aromo el ŝia korpo? Kiel forte mi esperas, ke mi havos ŝancon vidi ŝin!

Iutagon de la lasta tagdeko de majo, la diketa Bajmaj-onklo al mi alportis kartonon, kion laŭ lia diro poŝte sendis la Miaŭo-onklino, kiel la donacon por la Infana Tago. En la kartono estis nova librosako, literaturaj libroj, saltŝnuroj, volanoj kaj paro da rakedoj, ankaŭ kun longa letero. Mia koro rapide batadis kaj la sango ŝvarme fluis. Mi preskaŭ eklarmis, sed mi eltenis la larmojn. La diketa onklo ŝaltis sian poŝtelefonon kaj lasis min spekti la foton de la Miaŭo-onklino. Ah, kia belega onklino! Ŝiaj okuloj kaj grandas kaj brilas. Rideto restas sur ŝia vizaĝo. Ŝajnas, ke ŝi deziras interparoli kun mi. Spektante la foton,

miaj okuloj estis vualatajn de larma nebulo. Mi vere volis plori, brue plori, tamen en la oficejo de instruistoj mi ne povis plori, kaj mi devu esti malfebla knabino. Hejme estis unu foto de la gepatroj, la ununura de ili. Sed la foto jam putris, kaj iliaj figuroj fariĝis malklaraj. Plurfoje en sonĝo mi vidis la gepatrojn, kies figuroj ankaŭ estis malklaraj. Nokte de tiu tago, kiam mi spektis la foton de la Miaŭo-onklino, mi sonĝis, ke en la hejmon enpaŝis la patrino, kiu firme ĉirkaŭpremis min al sia brusto, odorante same kiel la onklinoj de la Bajmaj; mi forpuŝis ŝin por rigardi ŝian vizaĝon; ĉifoje mi klarege vidis ŝian vizaĝon, kiu similas al tiu de la Miaŭo-onklino tenera kaj belega; mi ĵetis min en la patrinan sinon, plorege vokante "Panjo".

Tiutagon antaŭ la Aŭtunmeza Festo, volontuloj de la Bajmaj al ni donacis diversajn lunkukojn. Multe da kunlernantoj domaĝis ilin manĝi kaj metis en la librosakon por gustumi kune kun siaj familianoj. Ankaŭ mi domaĝis. Kun lunkukoj en la manoj kaj la okuloj fermitaj, mi apogis min kontraŭ kasiŝeloarbo apud la klasĉambro, imagante: La laktosimila lunlumo radius tra la tero; la Miaŭo-onklino irus al mi; mi donus al ŝi la lunkukojn, kiujn ŝi ne manĝus kaj postulus min manĝi; mi rifuzus kaj persiste enbuŝigus al ŝi lunkukon pecon post peco, leĝere pugnante ŝian dorson; min varmigus la sunsimilaj ridoj sur ŝia ronda vizaĝo.

En sia letero, la Miaŭo-onklino al mi skribis: "Mi espras ne tion, ke vi devos nepre eniri faman universitaton kaj fariĝi eminenta homo kun granda atingaĵo. Mi nur esperas, ke ambaŭ vi kaj via frato povos esti sanaj kaj ĝoje kreskadi, kaj en la estonteco memvivtenadi kaj senĉagreni dumvive." Tamen mi ne devas mempostuli malmulte. Mi neeble atendas, ke la frato eniros universitaton, ĉar li ne interesiĝas pri lerno . Mi devas lernadi pene por eniri universitaton, eĉ la faman.

Oni diras, ke urbaj geknaboj havas bibliotekeeton en sia lernejo, kaj hejme siaj gepatroj ofte rakontas al ili. Nun mi ne envias ilin plu, ĉar geonkloj de la Bajmaj funkciigis en ĉiu klaso libroangulon, kie ni

povas deprunti diversajn librojn ŝatatajn. Dank' al la Bajmaj Eduka Fondaĵo, en ĉiu dormoĉambro nun povas aŭskultiĝi laŭtparolilo. Antaŭe je la enlitiĝa horo ni kutime petoladis aŭ interparolis pri monstroj kaj demonoj, tiel pro timo ni ne aŭdacis endormi. Nun la fabeloj el la laŭtparolilo akompanas nin endormi.

Ekde nun, ne plu nur al urbaj geknaboj apartenas Princino Neĝo, Harry Porter, Afanti k.t.p.; ne plu la montegoj ŝirmas nian animon, kaj ne plu fore de ni estas la ekstera mondo.

**2**

Ambaŭborde de Baro-rivero jam funkciiĝis novaj ŝoseoj, kaj veturiloj povas kuri pli rapide kaj sekure ol antaŭe. Oni povas fari negocojn pli facile, do la vivnivelo en la urbeto altiĝas iom post iom. La Bajmaj Eduka Fondaĵo ankoraŭ daŭrigas sian helpon al tieaj malriĉaj lernantoj per diversaj rimedoj. Jaron post jaro diplomiĝis gelernantoj, el kiuj la plej parto eliris el la montegoj por serĉi sian songôn.

Alproksimiĝas la komenco de nova semestro. Ĉe la pordo de la elementa lernejo de la urbeto Datan, staris svelta junulino, portante ĉapelon kun la oranĝflava Bajmaj-signo kaj dorsosakon plenŝtopitan ankaŭ kun la signo. Ŝi, aspektante tre laca, longe fikse rigardis la ŝildon super la pordo. Junulo, aspektante simpla kaj honesta, alkuris kun ŝvitoj plenaj sur la vizaĝo. "Franjo," viŝante la ŝvitojn per la basko, la junulo ridete diris: "ĉe la stacio mi ĵus sciiĝis de la ŝoforo, ke vi jam elbusiĝis kaj foriris. Ne trovinte vin survoje, mi divenis, ke vi certe venis ĉi tien. Vi jam ne restis hejme dum kelkaj jaroj kaj vi devus viziti unue la hejmon tuj post via reveno. Poste vi ĉi tie laboros ĉiutage. Ĉu vi timas, ke vi ne havos tempon viziti ĝin?"

La frato prenis la dorsosakon de la fratino, kaj ĉi tiu kapturnis kaj ŝerce diris: "Kelkaj jaroj pasis, viaj vortoj plimultiĝis, fraĉjo. Vi jam progresis. Mi ne hejmeniris pro la timo, ke vi pigrulo eble ne ordigis la domon, kiu certe malpuras terure."

“Ve! Franjo, vi ankoraŭ estas tia kritikema, kaj min ekriproĉas eĉ je via unua vido al mi post pluraj jaroj. Ne estu tia.”

Dum ili interparolis, la maljuna pordisto, rigardinte la oranĝflavan Bajmaj-signon surĉapele kaj sursake de la junulino, varme invitis la gefratojn eniri en sian dometon por teo.

La pordisto perplekse diris: “La semestro ankoraŭ ne komenciĝas, pro kio vi de la Bajmaj jam alvenis? Antaŭe ĉiufoje alvenis sep, ok aŭ dekkelkaj homoj per veturiloj, kaj hodiaŭ kial vi venis sola?”

La junulino ridis kaj diris: “Oĉjo, mi estas lokano de la urbeto Datan, iama lernantino de ĉi tiu lernejo. Diplomiĝinte el universitato, mi baldaŭ ekservos ĉi tie kiel instruistino. Nu, tuj kiam mi elbusiĝis, mi unue venis ĉi tie.”

“Oh, oh.” La pordisto laŭde pririgardis la junulinon, dirante: “Vere laŭdindaj estas vi, homoj de la Bajmaj, kiujn la geknaboj ŝatas elkore. Vi tre bone traktadas la geknabojn, ili ĉiuj sentas sin feliĉa kun via helpo. Bonvole iru spekti la galerion, kiu eksponiĝas bildoj de Bajmaj-homoj kaj infanoj.”

La ekspozicio konsistas el ses temoj: “Infanoj, Kresku sub Mia Akompano” prezentas fotojn de la eksterdomaj aktivadoj; “Viaj Ridoj Estas Sunlumo en Mia Koro” montras ridantajn vizaĝojn de infanoj; “Pentru la Ĉielarkon” - la pentraĵojn, desegnaĵojn, metiartaĵojn de infanoj; “Esperplena Kampo” - la eseojn pri librolegoj kaj idealoj; “Adiaŭon Nevole Diru” - fotojn de ĉiufoja adiaŭa amuzvespero de diplomiĝantoj; “Oraj Semoj” - fotojn de la diplomiĝintoj, kiuj, lernantaj aŭ laborantaj, ankaŭ fariĝis la Bajmaj-volontuloj. El “Oraj Semoj” la junulino malkovris sian foton. Kun eksciteco ŝi diris: “Ha, de kie oni trovis tiun ĉi foton, kiun eĉ mi mem ne posedas. Tiam mi estis tre juna, kiam mi forlasis. Plenkreskinte, mi multe ŝanĝiĝis je la aspekto. Kiel la instruistoj ankoraŭ povis rekoni min?”

La frato apude murmuris kvazaŭ al si: “Jes, ĉio multe ŝanĝiĝis. Duoble grandiĝis la lernejo, kiun eble vi apenaŭ rekonis. En la urbeto

plimultiĝis novaj domoj, kaj la vojoj ankaŭ ŝanĝiĝis, jam plilarĝiĝis. Sed, sed ...”

“Kion signifas via ‘sed’?”

“Sed la ponto super Baro-rivero, pri kiu vi revadas, ankoraŭ ne realiĝas. He, he.”

“La ponto super Baro-rivero?” Paŭzinte momenton la junulino diris: “Ĝi jam formiĝis.”

La frato rigardis la fratinon kun konfuzo.

Fingre montrinte al la galerio kaj sekve al sia brusto, la junulino emocie diris: “La ponto kuŝas ĉi tie, en la koro de la popolo. Ĝi ja estas oranĝflava korliga ponto!”

# PROFESORO LJU

Kiam usona esperantistino Katina Carry anoncis al mi, ke ŝi baldaŭ instruos en Ŝensi Financ-Ekonomia Kolegio, mi tuj memoras malnovan samideanon profesoro Lju instruanta en tiu kolegio. Mi konis lian nomon delonge, kaj ne vidis lian personon, kvankam ni ambaŭ loĝas en la sama urbo Siano. Pri lia kariero de Esperanto mi sciis de veterana esperantisto, ke komence li instruis Esperanto-kurson en la urba poŝtocentro, poste en la Nordokcidenta Universitato de nia provinco. Malgraŭ tio mi nun devas viziti lin por peti lian zorgon al la usona samideanino Katina, kiu baldaŭ instruos en lia kolegio…

Mi kaptis dimanĉon libera por la vizito, ĉar mi laboras ĉiun labortagon en ŝtalfabriko. La dimanĉa tago estis serena, kaj mi vizitis lian oficejon. Li estas mezalta, modesta kaj tre agrabla sinjoro. Sed lia reago mirigis min, kiam li komprenis mian intencon.

"Mi ne posedas Esperanton." diris la profesoro.

"Ĉu vere?" mi rigardis lin suspekte kun miro.

"Jes." respondis la profesoro.

"Kial? Kiel vi instruis Esperanton en la urba poŝtocentro?" mi demandis.

"Jen estas tio," trankvile komencis rakonti la profesoro:

Komence de la fondiĝo de la nova Ĉinio mi diplomiĝis de mezlernejo, kaj vivlaboris en la urba poŝtocentro. Tiam mi estis juna, kaj ankaŭ sopiris al studo en altlernejo. Por tio mi ne forlasis memlernadon de diversaj lecionoj. Iun tagon, kiam mi legas la anglan lingvon, neatentite aperis mezaĝa viro kontraŭ mia legado. Li senvorte mezuris mian mienon kaj okulumis pripensante ion. Mi estis konsternita je lia rigardado. Mi scias, ke li estas nova estro sendita de komunista registaro. Oni diris, ke antaŭ la fondo de nova Ĉinio li estis kaŝita partiano, kaj iam lernis Esperanton, pri kio mi tute ne konis ĝis lia apero.

"Mi aranĝos al vi novan taskon." ordonis la nova estro.

"Kia tasko? Mi ne havas kulpon. Mi nur lernas fremdan lingvon, kiam ĉiuj ripozas sen laboro." mi volis senkulpigi min kun timemo.

"Knabo, ne timu. Mi ŝatas junulon lernema. Mi donas al vi taskon instrui Esperanto-kurson, kiun mi organizos baldaŭ en nia poŝtocentro." decidante ordonis la nova estro, kaj amike ĵetis al mi sian manon: "Saluton!"

"Saluton? Kio ĝi estas?" mi volis scii, demandante al la nova estro.

"Saluton estas ‘你好’" milde ridis la nova estro.

"Saluton!" mi voĉoimitis lian prononcon mallaŭte.

"Saluton! Vi jam estas nova esperantisto kaj nia samideano."

"Mi ne scias, kio estas Esperanto." mi hontis je tio.

"Ĉu? Kiun lingvon vi lernas?" demandis la nova estro.

"La anglan mi lernas, sed mi ne posedas…" mi respondis.

"Ne gravas. La angla kaj Esperanto estas similaj. Vi kapablas instrui Esperanton." la nova estro jesdiris elokvente kiel fakulo.

"Permesu al mi konsideron. Mi eĉ ne havas lernolibron de Esperanto." mi hezitis.

"Mi kredas je vi, kaj ordonas al vi ĉi tiun taskon. Jen estas via instrulibro." dirante la nova estro donis al mi unu libreton maldikan kiel propagandan folion.

Kion fari? Mi estas juna, kaj unuafoje renkontas tian stilon simpla, sincera ankaŭ nerifuzebla. Fakte, min kuraĝigas tia stilo esprimita de la revolucia partiano kontraŭ malfacilo. Je tia stato mi petis kelkajn tagojn por koni Esperanton.

Post kelkaj tagoj mi jam povis legi la libreton. Fakte, ĝi estas tre simpla konsiste el la alfabeto kaj iuj sloganoj ekz.: "Esperanto estas revolucia lingvo", "La vivo estas batalo", "Lernu Esperanton por la nova Ĉinio" krom ĉiutagaj akuzativaĵoj "Saluton!", "Bonan tagon!", "Bonan nokton!" k.t.p. Kia lernolibro! Mi jam ne havis la antaŭan timemon. Ŝajne la nova estro estas ĝusta, ke mi estas kapabla instrui la kurson. Nun mi ankaŭ scias, ke la nova estro havas familian nomon Lin.

Mi iris trankvila al oficejo de la nova estro Lin.

"Saluton!" mi jam staris antaŭ lia ofictablo.

"Saluton!" la nova estro Lin kutime ĵetis al mi sian manon, kaj ĉifoje lia "Saluton!" estas iom intimevoĉa.

"Estimata estro Lin, mi deziras akcepti tiun taskon" mi eldiris decidon sen timo.

"Ne estu estimata estro, sed kamarado Lin" li korektis mian titolvokon, "Tio estas malbona kutimo de la feŭdismo. Voku min kamarado Lin." li klarigis al mi, "Ni ĉiuj estas revoluciaj kamaradoj, kiuj kune konstruas la novan socialisman Ĉinion."

Jes, tio estas nova kaj freŝa al mi, kaj mi senkonscie fariĝis sindonema sekvanto de la estro Lin, eĉ mi volus ĵeti min por tasko iu ajn je lia ordono.

Baldaŭ okazis la kursa ceremonio en nia poŝtocentro. La estro Lin kaj mi staris sur la podio. Li elokventis kaj konvertis ĉiujn ĉeestantojn, ke Esperanto estas revolucia lingvo, kaj lerni Esperanton estas revolucia tasko. Li estas vera oratoro staranta sur la podio, sed mi staris

sur la podio kiel fajrpoto, sentante multe akran okulumon de fraŭlinoj, kiuj taksis min kiel eksponaĵon. Poste, kiam mi parolis, mi fariĝis balbutanto. Ĉiuj ĉeestantoj ridis je amuzĝojo.

La ceremonio estis raportita kun bela foto sur la urba ĵurnalo, ankaŭ aperis kiel konciza novaĵo sur la ŝtata gazeto El Popola Ĉinio. Fakte en la nova socio oni interesiĝas pri novaj eĉ kuriozaj aferoj, kaj Esperanto apartenas al tia afero. Poste, dum la kursado kelkfoje min kaj la kurson intervjuis ĵurnaloj kaj revuoj. Tiuj intervjuoj konatigis min kiel novaĵulon tra la urbo. Pri tio estro Lin estis kontenta, ĉar li estas entuziasma esperantisto ĝustadirite Esperanto-propagandisto aŭ Esperanto-salutisto, kion mi konfirmis nur duonjaron post mia lernado de Esperanto.

Jes, post la duonjaro pli kurioza afero trafis min. Mi ricevis neatenditan leteron de fama profesoro Io Chou. Li volis inviti min instrui Esperanton en la Nordokcidenta Universitato en nia urbo! Profesoro Io Chou estas ĝentila kaj sincera, sed mi estis maltrankvila, ĉu mi mezlerneja diplomito povus instrui en universitato? Kvankam nun mi jam estas kuraĝa influite de la revolucia kamarado Lin, tamen mi ankoraŭ ne estas aŭdaca instrui en la universitato. Kompare en la poŝtocentro mi instruis al poŝtistoj kaj oficistoj, kiuj partoprenis mian kurson diversacele ĉu por fresaĵo ĉu por amikiĝo eĉ por flati al la estro Lin, en universitato la studentoj certe bezonas lingvoscion, kion mi ne posedas. Kion fari? Mi silentis antaŭ la tento, ne respondante al profesoro Io Chou.

Sekvan tagon la estro Lin alvokis min, kaj demandis: “Ĉu vi ricevis leteron de profesoro Io Chou?”

"Jes, mi ricevis, sed … " mi ne povis klarigi mian penson.

"Kamarado Lju, mi komprenas vian timon." la estro Lin konsilis, "Vi scias, ke la generalo Linbo fariĝis korpusa estro je sia aĝo dek-oka, kaj en Pekina Universitato kelkaj famaj profesoroj devenis de mezlerintoj kiel vi…"

"Sed tio okazis en revolucia tempo… " mi komentariis.

"Jes. Nuntempe estas la nova Ĉinio kaj nova periodo de la socialisma revolucio pli grandas ol iam ajn tempo" la estro Lin fervore agitis min, "Ni nun konstruas novan socion, kaj ni devas transpasi ĉiujn kutimaĵojn. Vi rajtas instrui en universitato, ankaŭ laboristoj kaj kamparanoj rajtas instrui en la universitato!"

Jen en tia tempo ĉio okazeblas, kaj mi komencis instrui Esperanton en la universitato. Sed sendube mi ne posedis Esperanton, aŭ mi ne havis sufiĉan tempon ellerni Esperanton, aŭ ĉiuj estis malstudema al scio krom novpolitika fervoro. Mia instruado por Esperanto daŭris nur unu semestron. Sekve alvenis ventego de la rusa lingvo kiel komunisma eduko devigita al ĉiuj studentoj, kaj ankaŭ okazis politikaj movadoj unu post aliaj. Esperanto hazarde trafis min kaj destine ne konvertis min. Malgraŭ ĉio danke al Esperanto mi saltis de la poŝtocentro en la universitaton. Nun mi estas profesoro de la angla lingvo, kiun mi neniam forlasas de mia lernanteco ĝis nun, kvankam hodiaŭ mi ne povas libere interparoli angle kun Miss Katina Carry. Sed Esperanton kiel donaĉaĵon mi jam redonis al la estro Lin. Mi ne ŝatas nomi lin kamarado, ĉar mi ne estas partiano. Mi ankaŭ ne sentas min lia samideano, ĉar mi ne posedas Esperanton, aŭ ne volas posedi Esperanton. Jen tio estas mia rakonto. Mi ne povas helpi vian samideanon Katina Carry.

Mi foriris de profesoro Lju, formale adiaŭinte sen samideaneco inter la esperantistoj. Ekstere, mi sopiris freŝan aeron, kaj mi havis novan lecionon, ke samideanoj ne estas ĉiuj, kiuj lernis Esperanton, kaj en la pionira tempo Esperanto apartenas nur al tiuj kredantoj je la idealo de Esperanto. Mi kapsupren rigardis la serenan ĉielon kun la brila suno, kaj konscias, ke en la mondo ne ekzistas miraklo lerni nepatran lingvon, ĉiuj devas pagi fervoron, sufiĉan tempon kaj longan praktikon por ellerni facilan lingvon Esperanto. Male, eĉ profesoro ankaŭ ne povas posedi la lingvon.

**Chielismo WANG Tianyi**
Siano, la 23an de Dec., 2020

# *Kion Diras la Serpent-kaptisto*

**▯ LIU ZONGJUAN**

En 1a ĉirkaŭaĵo de Jongĝoŭ sin trovas strangaj venenaj serpentoj, kies nigran korpon ornamas blankaj strioj. Se ili tuŝas herbojn aŭ arbojn, la herboj kaj arboj ĉiuj forvelkas; se ili mordas homojn, neniu el ili povas ilin rezisti. Tamen se oni kaptas kaj sekigas ilin por medicino, ili povas kuraci lepron, rigidan kurbiĝon de membro, hemoroidon kaj ulceron, forigi la putriĝintan karnon kaj mortigi la malsanigajn vermojn. En la komenco la imperia kuracisto ordonis kolekti tiajn serpentojn per dekreto de la imperiestro, dufoje en ĉiu jaro. Tiuj, kiuj kapablas kapti ilin, estas ĉie varbitaj kaj ilia imposto povas esti pagita per la kaptaĵo. La loĝantoj de Jongĝou konkure okupiĝas pri tio.



Estas iu nomata Giang, kies familio ĝuas tiun anstataŭpagon jam tri generaciojn. Demandite de mi, li respondis: "Mia avo mortis pro tio. Ankaŭ mia patro mortis pro tio. Mi daŭrigas la okupon jam dek du jarojn kaj preskaŭ mortis kelkajn fojojn." Parolante li mienis tre malgoje.

Ankaŭ mi malĝojiĝis kaj diris: "Ĉu ĝi estas doloriga al vi? Lasu min diri al la koncerna instanco por ŝanĝi vian servon kaj denovigi vian pagadon de imposto. Ĉu bone?"

Tiu Giang ege malĝojiĝis kaj respondis kun larmaj okuloj: Ĉu vi volas min kompati, ke mi vivu plu? Tamen la malfeliĉo kaŭzita de mia

okupo estas multe malpli granda ol tiu kaŭzota de repagigo de mia imposto. Se mi ne okupiĝus per tiu ĉi servo, mi delonge mizeriĝus. Jam sesdek jarojn mia familio loĝadis ĉi tie ĝis nun por tri generacioj. Tagon post tago plimalfaciliĝis la vivo de la najbaroj. Fordoninte ĉion produktitan el sia tero kaj la tutan enspezon de sia familio, ili devas formigri tien kaj tien kun larmoj kaj vekrioj. Malsataj kaj lacigitaj, ili falas teren. Ili vagas en pluvo kaj vento, varmego kaj frosto; ili spiras miasmon, mortas kaj iliaj kadavroj kuŝas unuj sur la aliaj, Neniu el tiuj familioj, kiuj antaŭe loĝis ĉi tie samtempe kun mia avo, ankoraŭ restas nun. Malpli ol du aŭ tri e1 ĉiu deko da familioj, kiuj antaŭe loĝis ĉi tie samtempe kun mia patro, ankoraŭ restas nun. Malpli ol kvar aŭ kvin el ĉiu deko da familioj, kiuj loĝis ĉi tie kun mi dek du jarojn, ankoraŭ restas nun.

Ili aŭ mortis aŭ translokiĝis. Sed mi postrestas nur dank' al serpent-kaptado. Kiam la tiranaj pedeloj alvenas al nia vilaĝo, ili ĉie bruegas kaj kaŭzas tumulton eĉ ne lasante la kokojn kaj hundojn resti en paco! Mi zorgeme leviĝas kaj rigardas al la fajenca poto. Kiam mi trovas mian serpenton ankoraŭ tie, mi rekuŝiĝas trankvile. Zorgeme mi nutras la serpenton kaj prezentas ĝin je la fiksita tempo. Post la prezento mi revenas kaj tre bonguste manĝas kion mia tero produktas kaj tiel vivtenas min ĝis la fino de mia vivo. Mi riskas morto-danĝeron nur dufoje en ĉiu jaro kaj gaje vivas dum la resta tempo. Kiel do min trafus la malfeliĉo, kiu turmentas miajn najbarojn ĉiutage? Se mi eĉ mortus pro tio ĉi, mi mortus pli malfrue ol miaj najbaroj. Kial do mi kuraĝus opinii la servon doloriga?"

Aŭidinte tion, mi fariĝis des pli malĝoja. Konfucio diris: "Despotismo estas pli kruela ol tigro." Antaŭe mi dubis pri tiu aserto. Nun, laŭ la kazo de tiu Giang, tio tamen pruviĝas kredinda. Ho ve! Kiu scias, ke la krueleco de la eldeviga imposto estas eĉ pli terura ol tiu de venenaj serpentoj. Do mi skribas tiun ĉi eseon, por ke tion notu tiuj, kiuj esploras pri la vivstato de la popo1o.

Trad. **PANDIŜO**

# Peomoj en Prozo

Verkis **M. Ĉ. Kŭo** Esperantigis **Zee**

## Vesperiĝo

Mi ludas kun miaj tri infanoj sur la herbejo apud la domo kiam la vespera suno bruligas la ĉielrandon super la maro, kaj la brovoforma nova luno jam de post freŝe ruĝa nubofendo elrigardas.

Kelkaj bovoj paŝtiĝas sur la herbejo, jen kaj jen blekas per tirata voĉo, kvazaŭ ili alvokus la mastron por ilin rekonduki.

Niaj du kikinoj kaj kelkaj kokidoj revenas unu post alia de la tombejo de l' najbara monaĥejo.

La patrino de la infanoj, staranta en la kuireja pordo, ĵetas plenmanon da grajnoj sur la sablon antaŭ la pordo.

La kokinoj ekklukas, ankaŭ la kokidoj brue kverelas por la manĝaĵo.

“Vere bonas la rezultato de ĉi jaro, jam dek ni elbredis.”

Kaj gaja sonvibrado naĝas tra la orkolora vesperaero.

## Ink-pentraĵo

La ĉielo estas cindrokolora, sunlumo tute ne.

La marakvo estas mirige malhele blua, ondetoj lektantaj la bordon, estigas kvazaŭ ŝmacadon de fiŝaro.

Tio estas la antaŭsigno de la tempesto.

La insuloj en la maro senmovas kvazaŭ skulptaĵoj el ebono.

Mi paŝas al la sabla marbordo kunportante skatolon da manĝaĵo,

kaj eksidas en alligita fiŝboato.

Regas langvoro kaj melankolio… mi malfermas la skatolon, sed ĝin tuj refermas.

Kapturnante mi ekvidas la solecan krematorion en la pinarbaro. Kaj grize blanka, ŝvebanta fumgarbo leviĝas el la alta kamentubo konstruita el ruĝaj brikoj.

## Kamelio



Hieraŭ vespere, revenante de la monto, mi kolektis kelkajn vicojn da tribloj, faskon da kratagoj, kaj kelkajn branĉetojn de kamelio kun butonoj.

Mi ĵete enmetis ilin en feran poton kaj ĝin pendigis sur la muron.

Brile ruĝaj kratagoj kaj freŝe flavaj tribloj ĉe la apudesto de l' profunde verdaj kamelibranĉetoj donis impreson neniel priskribeblan.

La nigra ferpoto similis rokon kovritan de muskmantelo.

Hodiaŭ matene kiam mi vekiĝas el profunda dormo, en la malgranda ĉambro ŝvebas freŝa, sennoma florodoro.

De kie ĝi alblovas?

Sur la kameli-branĉetoj ĵete enmetitaj en la ferpoto ekfloris kvar bankaj, floroj!

Ho, jen la aŭtuno vivas en mia poto!



# Kanto pri Vento 风之歌

原作：**Leo Belmont** 翻译：**李传华**

Se havus mi forton kaj spiron de l' vento,
De l' viv' aliiĝus fason';
Mi estus semanto de ama la sento,
ŝiranto de ĉia malbon'.
Per polvo friponojn blindigus mi kure,
Falegus malver'-bastion'!
Mi kverkojn fierajn fleksadus terure,
Karesus je roza la kron'.
Mi plorus poeton, sur tomb', kun betulo,
Mi vipus la maron sen lac';
Sur vojo ŝtonegojn mi skuus fortulo,
Ke muĝus la nokt' per minac'.
La poplon maljunan al dormo lulante,
Ridetus mi kun l' akaci';
Fluginte sur kampon, sonorus mi kante,
Ho! forton de l' vento al mi!

如果有了风的气魄与力量，
我要让生活改变模样；
我要播种爱情和友谊，
我要把人间丑恶一扫而光！
我要用灰尘弄瞎坏蛋的眼睛，
我要推倒那虚伪邪恶的堡垒，
并折断那骄横傲立的橡树，
爱意地抚摸着美丽的玫瑰。
我将和白桦一起在诗人坟前哭泣，
我将鞭打海面而不知疲惫；
我会将路上的巨石撼动，
在黑夜里发出可怕的霹雳。
摇着哄着老白杨进入梦乡，
我和那相思树微笑久仰；
唱着歌儿我飞过了田野，
啊，给予我吧，风的力量！



# Smeralda Lago

**Harpina**

Grandega smeraldo de 26 kvadrataj kilometroj kuŝas en la profundo de la dezerto sur la Antikva Silka Vojo. La lago nomiĝas "Smeralda Lago", ĉar ĝi estas klara kaj blua sub la suno kaj aspektas kiel smeraldo.

La 11-an de septembro 2020, mi venis al loko, pri kiu mi eĉ ne povis revi: Smeralda Lago Mangya en Ĉinghajo montras sian primitivan belecon antaŭ miaj okuloj: tiel kristala kaj pura kiel glacio.

Subite, mi estis ravita de la Spegula Lago, kie renkontiĝas la smeraldaj kaj blankaj salaj floroj: iuj el la salaj floroj malmergiĝas, kaj aliaj sinkas en la lago. Antaŭ tiel bela spektaklo, mi malhavis taŭgajn vortojn por laŭdi ĝin dum kelka tempo, sed en la koro mi ripetadis nur du frazojn “Tre bela!” kaj “Tre belega! ...

La Smeralda Lago estas tiel bela, ke mi eĉ ne povas kredi, ĉu ĝi estas realaĵo aŭ songô.

Vizitantoj ŝajnas eltrovi praan "bronzan spegulon" profunde en la dezerto. Ĝi reflektas la graciajn figurojn kaj vizaĝojn de la vizitantoj, kiuj dialogas kun la iluziaj ombroj. Tio aldonas nuancon de tenereco al la plej soleca kaj senhoma Mangya.

Pro la malsamaj densecoj de mineralaj ingrediencoj la lago formiĝas en buntaj vidaĵoj. Kiam la vento kaj ondoj estas trankvilaj, ĝi dise kuŝas ĉirkaŭe kiel speguloj. La koloroj estas pure diafanaj. La helverda, smeralde verda kaj malhelverda nuancoj faras la lagon kiel jadon inkrustitan sur la Gobio, kiu famiĝas kiel la nova "spegulo de l’ ĉielo".

Ĉi tie ondas la vasta blua spaco, etendiĝas mil hektaroj da kolora glazuro, buntas arĝentaj perloj kaj jadoj, kaj vidiĝas la ebriiga glazuro kiel blua kaj blanka

porcelano. Sur la fundo de la kvadrataj lagetoj ĉiuflanke estas kovritaj per salaj koralaj rifoj, kontraŭ kiuj oni povas marŝi sub la akvo por spektado. Ĝi estas bonega loko por fotado en la "spegulo de l' ĉielo".

"Mi volas reiri al la homa mondo, sed mia ombro jam falis en felandon."

La Smeralda Lago estas pura scenejo el glaciaj kristaloj kaj jadoj, kie videblas flirtantaj vestaĵoj de feinoj… Ĉi tiu bronza spegulo igas la vizitantojn malstreĉigi siajn brovojn kaj plezurigi la koron. Ĝi estas sonĝlando trankviliga kaj kvietiga.

Sub la sunlumo la lagakvo montras malsamajn kolorojn. La plej bela sceno por fotilo de Smeralda Lago estas la reflekto sub la refrakto de sunlumo. Homoj promenas sur la akvo kun ombroj sur la ĉielo. La lago estas natura artaĵo impone bela kaj spirraba pitorekejo!

La Smeralda Lago en Mangya estas ankoraŭ ne malfermita al la vizitantoj organizitaj de vojaĝagentejo. Nun oni povas turisme senpage en tiu loko, kiu atendas ekspluatadon. Tiea pejzaĝo estas vere animskua.

La beleco de Mangya Smeralda Lago estas kolekto de grandiozaj kaj brilaj speguloj dotitaj de la ĉielo kaj la plej magia bildalbumo en la okcidento de la Okcidento.

# 翡 翠 湖

一块 26 平方公里的巨大翡翠躺在古丝之路的大漠深处，因湖水在阳光下清澈湛蓝，色如翡翠，故得名“翡翠湖”。

2020 年 9 月 11 日，我来到了一个做梦都想不到的地方：青海茫崖翡翠湖以原生态的美展现在我的眼前，它是那样冰清玉洁一层不染。

我一下子被翠绿碧透与莹白如玉的盐花交汇的镜湖给惊艳呆怔：盐花有的浮出水面，有的潜入湖中，那万般姿态，美得一时没有了词语，只会心里一次次重复这两句话，太漂亮！太美了！！！ ……

翡翠湖美得使我不敢相信，眼前所见是梦幻还是真实？

游人好似在大漠深处捡到一个古意昂然的“青铜镜”，映照着曼妙的身姿和容颜，与梦幻影子恍若对话，给最寂寞、荒凉的茫崖增添了一抹似水

柔情。

由于所含矿物质浓度的不同，形成了颜色多彩的景象，风平浪静时，宛若镜面般散布在四处，颜色纯美剔透，淡青、翠绿、深绿的湖水使之如同镶嵌在戈壁上的翠玉，一跃成为新的“天空之镜”。

这里浩淼碧波，琉璃千倾，珠玉般银润缤纷，呈青花瓷陶醉的釉彩；田字形的每方湖底长满盐珊瑚礁，能入水对影行走，是天空之镜的绝佳拍摄地。

"本欲转身回红尘，奈何影子落仙境”。

翡翠湖是冰晶玉洁的舞台，有窈窕淑女顾影自照的衣袂飘飘……

这方青铜宝镜让游人眉目舒展，心旗摇曳。是透彻心扉、宁静致远的梦境。

在太阳光的照射下使湖水呈现出不同的颜色。翡翠湖最美的镜头就是阳光折射下的倒影。人在水上走，影在天上游。此处壮美无比，精妙绝伦的自然艺术，叹为观止的镜面之美。

茫崖翡翠湖，一个旅行社还未涉足之地，不收费，未开发，景色非常震撼。

茫崖翡翠湖之美，是上天赐予的瑰丽璀璨的宝镜荟萃；是西部之西最魔幻的画册。

# Verŝajne

▯ ***Christian Rivière***

Miaj gepatroj arigis en si ĉiujn homajn kvalitojn. Ili kvazaŭ simbioze kompletiĝis. Objektive, oni almenaŭ rekonu, ke la evidentan senzorgecon de mia patro kompensis la konata memfido kaj efektiva fidindo de mia patrino.

La someron antaŭ mia naskiĝjaro, mia patro maltrafis la starton de alloga krozado, en kiu mia patrino estis pasaĝero. Kun sia valizo en mano kaj memriproĉoj en la okuloj, li korŝire konstatis, ke la ŝipo jam nereteneble foriras al la oceano.

Kiel konfirmis poste miaj du pliaĝaj gefratoj, se nia patro ne havus tiun fuŝan inklinon maltrafi jen ŝipon, jen nokto-trajnon, jen aviadilon, ni verŝajne estus naskitaj.

# 很 可 能

**克里斯坦•瑞维埃** 原作 **庄企雄** 译

我的父母亲集全人类的优良品质于一身，这真是一对共生互补的人儿啊。起码客观上应该承认，我母亲那众所周知的自信和踏实可靠弥补了我父亲令人一望即知的漫不经心。

在我出生前的那个夏天，我父亲错过了那班极具诱惑的海上游轮的启航，我母亲就坐在那船上。我父亲手提着旅行箱，眼里充满了自责，他感到撕心裂肺而且忍无可忍，因为那艘游轮已经离开码头，向一望无垠的大洋驶去。

后来我的哥哥和姐姐也认为，假如我父亲没有那种糟糕的习惯，不是搭不上船，就是错过了晚上的火车，或者是坐不上飞机，我们可能早就出生了。

*(2019 UEA 文学竞赛微型小说一等奖)*

# Anekdotoj

## Pacientoj parolemaj

Doktoro A. ne ŝatis, ke liaj pacientoj parolis pli ol necese, ĉar ilia babilado malhelpis liajn pripensadojn. Inter sia klientaro li havis sinjorinon, kiun li ne sukcesis silentigi kaj kiu kutimis interrompi lin en iiaj demandoj kaj konsiloj. Kiam oni denove venigis lin al ŝi, li ne sukcesis konstati ŝian malsanon, ĉar ŝi ne lasis lin finparoli.

Tiam li diris al ŝi:

„Bonvolu montri vian langon!"

La sinjorino obeis, sed jam ŝi refoje komencis paroli, kiam li ripetis sian peton aldirante: „Sed iom pli longe, mi petas.“ —

Kiam la lango nun elestis, li sukcesis neinterrompite diri kvazaŭ rapidkure:

„Nun, mi petas, lasu la langon elbuŝe, ĝis kiam mi estos finparolinta."

# Pri logiko

La floroj de la trifolio estas fruktigataj de la burdoj, kiuj transigas la florpolvon de unu floro sur la ahan. Se oni do deziras multe da trifolio, multaj burdoj estas necesaj.

Rezultas do: Ju pli da burdoj, des pli da trifolio.

Bedaŭrinde la burdoj ne povas plimultiĝi laŭdezire, ĉar la kampomusoj persekutas kaj mortigas ilin.

Rezultas do: Ju pli da kampomusoj, des malpli da burdoj, des malpli da trifolio.

Ankaŭ la kampomusoj ne povas plimultiĝi senlime, ĉar iliaj malamikoj estas la katoj, kiuj persekutas kaj mortigas ilin.

Rezultas do: Ju pli da katoj, des malpli da kampomusoj, des pli da burdoj, des pli da trifolio.

La katoj povas plimultiĝi laŭdezire, se ili havas multajn ŝirmantinojn inter la needziniĝintaj fraŭlinoj.

Rezultas do: Ju pli da needziniĝintaj fraŭlinoj, des pli da katoj, des malpli da kampomusoj, des pli da burdoj, des pli da trifolio.

La trifolio estas la plej bona nutraĵo por la bovoj.

Rezultas do: Ju pli da trifolio, des pli da bovoj.

Grandnombra bovaro estas signo de granda bonstato de la tuta lando.

Rezultas do: Ju pli da trifolio, des pli da bovoj, des pli granda la bonstato de la lando.

Se la bonstato de iu lando estas granda, la nombro de la geedziĝoj pligrandiĝas, t. e. ĉiuj fraŭlinoj trovas edzojn.

Rezultas do: Ju pli da trifolio, des pli da bovoj, despli da bonstato, des malpli da needziniĝintaj fraŭlinoj.

Rezultas do resume: *Ju pli da needziniĝintaj fraŭHnoj,* des pli da katoj, des malpli da kampomusoj, des pli da burdoj, des pli da trifolio, des pli da bovoj, des pli da bonstato, *des malpli da needziniĝintaj fraŭlinoj !*

——el ***Legolibro*** de **P. William**

# Karikaturo


Majstro?
Ĉu vi aŭdas min?
Jes, kion vi volas?
Kiel mi atingas la alian flankon de la rivero?
Vi jam estas tie!
Ho ve!

## 世运短波

★ 2020年6月27日，新乡世协会长刘家和、常务副会长吕砚军共同策划并亲自带队一行13人到新乡市平原湖，举行了庆祝党的生日活动，主题为《向黄河母亲致敬》

★ 2020年7月26日晚上19：50分，纪念世界语创立133周年网络联谊会在新乡世协理事群如期举行，秘书长贾荣霞以双语的形式主持，节目有诗歌朗诵、豫剧、笑话、独唱等等。

★ 8月22日新乡世界语协会常务副会长吕砚军、副会长朱命合等走进红旗区新机社区居委会为第一批学员宣传讲授世界语。

★ 9月29日上午九点，新乡市世界语协会艺术团与向阳办事处新机社区共同在新机社区广场举办了一场庆祝建国71周年文艺演出。

★ 12月6日世界语工作室和黄河编辑部众筹的《Plena Vortaro de Esperanto》(世界语原文大词典) 出版，该书A4开本，彩色印刷，分上、下两册,共1400页，根据PIV2005网络版印刷，雪松书屋网店有售。

★ 12月13日新乡世协一行10人到离市区20公里以外的太阳村同孩子们一起庆祝柴门霍夫诞辰161周年，秘书长贾荣霞发言并教孩子们用世界语唱“在地球上”，为孩子们表演的还有新疆舞，诗朗诵，葫芦丝等节目。

★ 12月14日中国文联学雷锋文艺志愿服务队从北京来到新乡县小冀镇聂庄村践行《文艺进万家，健康你我他》活动，新乡世协艺术团受文联之邀参与演出了芭蕾舞《祝福祖国》。

★ 12月15日孔雷编著的《绿太阳文集》电子书出版。

★ 12月23日本刊编辑部向参加“黄河杯”世界语阅读活动并全程读完《La Eta Princo》的23名国内世界语者颁发了荣誉证书。活动由浙江世协李忠民负责组织，济源周为民负责阅读统计。

★ 12月30日世界语工作室和黄河编辑部众筹出版《世界语百科全书》，A4开本，软精装，580页，雪松书屋网店发行。

雪松书屋：http://shop.kongfz.com/41603/